


TRIDEKJARIĜO

Konsiderante la gravan fakton, ke la Esperanto-Movado bezonas senĉese konstantan akceladon, kaj konsiderante, ke la junularaj Esperantistaj grupoj estas unu el la ĉefaj rimedoj por efektivigi tiun akceladon, kaj agnoskante, ke la esto de tut-Brazila junul-organizaĵo konsistigas neflankenlaseblan elementon por homogena agado en Brazilo, ni, junuloj, sub-skribintaj tiun ĉi deklaron, plene aprobas la fondon de tia organizaĵo nomota B.E.J.O. (Brazila Esperantista Junulara Organizo)



Enkonduko

Jen la invito promeni tra la historio de BEJO. Ni klopodis meti tie ĉi la plej interesajn kaj kuriozajn informojn registritajn de la tiamaj junaj esperantistoj. La historio de BEJO estas vera respegulo de la junulara brazila historio, pruvante ke en BEJO estas tiom da "Brazila Junularo" kiom da "Esperantista Organizo". Tie ĉi oni konscios pri la sinteno de la spektantoj de la famaj "festivaloj de populara muziko" de kie estis lanĉitaj nomoj kiel Chico Burque de Holanda, Milton Nascimento, Gutemberg Guarabira. Gutemberg Guarabira?!?! Jes. Legu kaj sciu la antaŭvidon fare de la raportisto por la estonto de ĉiu el ili. Ĉu iam vi aŭdis pri "Brazila Nova Kino"? Ĉu Gláuber Rocha?

Same kiel la artaj kaj movadaj novaĵoj, ankaŭ la politika portreto de Brazilo estis priskribita. La portreto de iu Brazilo konata de la nuntempaj BEJOanoj nur per folietonoj kaj televid-serioj. Pri la kvanto da informoj, ni klopodis arigi ilin el ĉiuj periodoj. Al tiuj, kiuj kontribuis, ni dankas kaj omaĝas. Bone, nur restas malfermi la pordon de tiu ĉi tempo-ĉambro, inviti vin eniri kaj deziri al vi la plej agrablan sperton!

La kompilintoj
BEJO - Estraro

Enhavo

Enkonduko	2
Salutmesaĝoj	3
La Deklaro de Santos Dumont	4
Bilda Memor-Libro	5
Intervjuoj	6
Interesaj Tekstoj	13
Dua Festivalo pri Populara Muziko	15
La Brazila Nova Kino	17
Amuzaĵoj	ĉie

MEMORE al forpasintaj André Luís Fausto de Sousa,
BEJO-aktivulo, kaj lia patro Álvaro, subtenanto.

Salutmesaĝoj

Jen la alveno de iom da stabileco kaj reordigo al la brazila junulara movado. BOJE, ve! mi intencas diri BEJO, aktiviĝas kaj alvenas al sia tridekjariĝo. Kvankam ĉio estis en ordo, estis antaŭe plendo pri malagemo. Danke al tre profitdona rilato kun BEL; helpe de ĉiuj plej modernaj rimedoj (fakso, elektronika poŝto, interreto — mi scias ke iu priridos nin en la kvardekjariĝo pri tio), ni sukcesas nuntempe rapidajn kaj efikoplenajn kontaktojn kun la ceteraj eroj de la movado brazila, amerika kaj monda. Kaj per efikaj rilatoj ni volas alporti al agemo la plej renovigan kaj evolvigan forton de la movado, la junulojn. Ĉar ni scias ke estas la junuloj la indikantoj kaj enkondukantoj de tiuj ŝanĝoj, kiuj necesas por ke iu socio adaptiĝu kaj evoluu. Tion ni rigardcelas sen flankenlasi la amuzadon, ĉar ni scias ke al nenia celo indas alveni per serioza kaj ĉagreniga vojo.

Do, gesinjoroj, iru ni!

Cláudio Zaina
Prezidanto de BEJO

Ene de la 33-a Brazila Kongreso de Esperanto kaj 18-a Kongreso de BEJO, en Curitiba, konstateblas la firma paŝado de longdaŭra vojo kunlabora.

Sinteze en la historio de E-Movado elmontriĝas ke unuope grupoj, kluboj, asocioj kaj organizaĵoj agante kompletigas iasence la tuton. La karakterizo de unu ne malhelpas tiun de la alia... En tiu senco okaze de komuna efektivigo, kiel la nuna, eĉ se dumtempa, elmontras pozitivan atingon.

La kronologia riĉeco sub ĉiuj aspektoj de administrado, ene de la Federacia sistemigo, kiel libroservo, eldonado, informado, instruado, eventoj, departementoj kaj komisioj, reprezentas strebon kaj evoluigon je koncernaj etapoj de gradoj.

La vojo estas ampleksa... kaj kompleksa kaj dependas de ni ĉiuj, senescepte.
NI LABORU KUNE!

Symilde Schenk Ledon
BEL-prezidantino

Mi tutkore gratulas al Brazila Esperantista Junulara Organizo okaze de la 30-a datreveno de ĝia fondo. Kvankam BEJO spertis en sia vivo leviĝojn kaj malleviĝojn de aktiveco, vi rajtas rerigardi al via ĝisnuna historio kun fiero. Multaj gejunuloj ricevis dank' al BEJO la ŝancon ĝui kaj praktiki Esperanton kaj labori por ĝia plivastiĝo.

Plua laboro necesas por plifirmigi la ligojn inter junaj esperantistoj de Brazilo kaj de la cetera mondo, sed oni jam estas sur bona vojo. Pri tio atestas, ke BEJO-ano fariĝis estrarano de TEJO. Sekva paŝo estos okazigo de Internacia Junulara Kongreso en Brazilo, espereble baldaŭ!

Junaj homoj ĉiam estis flagoportantoj en nia movado. Ludoviko Zamenhof estis lernejano, kiam li ekkreis nian lingvon, kaj 27-jara, kiam li lanĉis ĝin. Hector Hodler estis 20-jara, kiam li fondis UEA. Mi esperas, ke por la brazila kaj internacia movadoj kreskos el la vicoj de BEJO ĉiam pli da novaj aktivuloj, kiuj kun fervoro kaj freŝaj ideoj antaŭenigos nian aferon!

Osmo Buller
Ĝenerala Direktoro de UEA

La Deklaro de Santos Dumont

La Naskiĝo de BEJO

Konsiderante la gravan fakton, ke la Esperanto-Movado bezonas senĉese konstantan akceladon, kaj konsiderante, ke la junularaj Esperantistaj grupoj estas unu el la ĉefaj rimedoj por efektivigi tiun akceladon, kaj agnoskante, ke la esto de tut-Brazila junul-organizaĵo konsistigas neflankenlaseblan elementon por homogena agado en Brazilo, ni, junuloj, subskribintaj tiun ĉi deklaron, plene aprobas la fondon de tia organizaĵo nomota B.E.J.O. (Brazila Esperantista Junulara Organizo), fondas ĝin, kaj promesas labori en la kadroj de la programo por ĝi starigita en la unua estrara kunveno, okazinta en la 30-a de Julio de la 1967-a, en la II-a Seminario de Esperanto en la urbo Santos Dumont, MG.

Divino dos Santos, Cecilia Bernardes, Francisco Regadas, Helena Maria Fonseca, Carlos Mello, Gustavo Barbosa, Cesar Leal, Roberto Nogueira, Humberto Ferreira, Wilson Martins, Francisco Wechsler, Pedro Cavalcante, Aloísio Sartorato, Francisco Barbosa, Marcelo Garcia, Helder Lopes, Jair Sales, Paulo Viana, José Cabral, Luiz Evangelista, Aloisio Marques.



Partoprenantoj de la unua brazila junulara renkontiĝo



Bilda Memor-Libro



Impuls

OFICIALA ORGANO DE B.E.J.O.

– BRAZILA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO –

1-a Jaro — OKTOBRO-NOVEMBRO-DECEMBRO — N-ro 1

Jen la reprodukto de la titolo de la unua "Impulso",1967. En ĝi oni povis legi pri la Deklaro de Santos Dumont, la fondiĝo kaj agado fare de junuloj, raporto pri la dua internacia festivalo de populara muziko, pri fuŝ-licencoj uzata en E-a poemaro i.a.



"Miss" BEJO 1977, elektita en Santos, SP.

Lokoj:
1-a: (centro)
Heliana Correa (SP)
2-a: (maldekstre)
Estela (GO)
3-a:(sub rigardo de Z)
Denise Deslandes (RJ)



De maldekstre staras:
Eliana (RN), André Luiz Fausto (forpasinta, RJ), Luiz Alberto Coelho (RJ), grava nekonatulo, Heliana Barrocas (SP), Rosana Caramez (RJ), Denise Deslandes (RJ) kaj du pliaj nekonatuloj;
sidas:
Ciro Gomes de Freitas (MT), Néia Lúcia de Souza (DF), kaj du movadaj nekonatuloj.

Intervjuoj

Mia nomo estas **Néia Lúcia Souza** kaj mi estas 41-jaraĝa.

Esperanton mi konis de la infanaĝo sed mi nur sukcesis fari la kompletan bazan kurson en 1973, en Goiânia-GO. Tiam BEJO estis neaktiva kaj ĝia dokumentaro estis trovita en 1974-1975, kiam alia goianano translokiĝis al Rio de Janeiro kaj ĉeestis esperantan kurson en Kultura Kooperativo de Esperantistoj -KKE.

La kunveno por pridiskuti eblecojn restarigi BEJOn okazis dum la Brazila Seminario de Esperanto, evento organizita de KKE, en Valença - RJ, 1975. Ĉeestis la kunvenon ĉirkaŭ 50 gejunuloj el diversaj urboj el Brazilo. La gejunuloj komencis engaĝiĝi kaj alflanke la plenkreska movado komencis reagi ĝenite.

Ni multe demandis, serĉis, kritikis...

Mi ne esperantiĝis pro la junulara movado sed mi esperantistis pro ĝi.

Bejo favorigis mian restadon en la esperanta medio pro ĝia plej alta kvalito: esti memstara organizaĵo kie la gejunuloj havas kondiĉojn praktiki, lerni, provi novajn vojojn.

Ĝi havas la esencon de libera forumo kie la gejunuloj povas demandi, plendi, kontraŭstari la stagnecon aŭ hipokritecon kaj kromajn misfunkciojn de la cetera movado.

Al BEJO mi ŝuldas mian tutan movadan vivon kaj mi estas ege danka al ĝi.

Biografieto de **Hilarina Aires**

Mi estas 31-jaraĝa (naskiĝdato 10.09.65). Mi ekkonis E-on en 1979, pere de Ramatis Pessoa de Luna, entuziasma E-disvastiganto. Tiam mi opiniis E-on simpla kuriozaĵo kaj tuj forgesis ĝin. Kiel mi ĉiam ŝatis fremdajn lingvojn, mi decidis, en 1986, partopreni kurson de P-ro José Elias Barbosa Borges, ĉe Federacia Universitato de Paraíba; krome mi opiniis E-on malpli malfacila lingvo. Bedaŭrinde tiu kurso mallonge daŭris, kaj mi devis do plu lerni ĝin sole. En tiu dua fazo, mi vere ekŝatis tiun lingvon kaj komencis kredi je ĝia inklino esti internacia kaj neŭtrala lingvo. Pro tio mi ne plu ĉesis lerni ĝin kaj komencis ja praktiki ĝin per korespondado, abonado de periodaĵoj kaj aĉetado de facilaj verkoj. Mi ja ekpraktikis ĝian paroladon en la unua nacia kongreso de Esperanto, kiun mi partoprenis, en Campo Grande-MS (1989).

Malgraŭ ke mi esperantistiĝis iom frue, mi kontaktiĝadis precipe kun plenkreskuloj kaj tre malofte turnis min al la junulaj institucioj kaj same malofte partoprenis porjunulajn aranĝojn. Fakte mia partopreno limiĝis nur al regula remembriĝo al TEJO. Nur post la 14-a BEJK, en Barra do Garças-MS (1992), mi regule aniĝis al BEJO ĝis mia "adoltiĝo". Pri tio, kaŭze de mia "adolta" sinteno, komence de la 90-aj jaroj mi partoprenis komunan aktivadon kadre de E-asocioj de brazila nordoriento. Tiam, dum ĉirkaŭ du jaroj mi redaktis la nurajn ses numerojn de *Nordorienta Informilo* (mi estas ĵurnalistino) kaj helpis organizi eventojn, nome laborkunsidojn, prelegojn kaj E-kursojn en mia urbo kaj la nacian kongreson en Natal (1994).

Kiel juna aktivulino, mi fariĝis reprezentantino de BEJO por Nordoriento en la periodo 1992/94, post partopreni la 14-an BEJK. Mi ankaŭ fariĝis korespondantino de TEJO-Tutmonde

pri Sudameriko de 1993 ĝis 1994.

En mia persona historio ĉe junulara E-movado, mi elstarigas mian partoprenon en la 15-a BEJK, en Natal (1994), kiam mi, kune kun Néia Lúcia Souza, Fabrício Valle kaj Ilmar Ferreira, gvidis fulman kampanjon por membriĝo al BEJO, kiu travivis seriozan krizon minacantan ĝian supervivon kiel organizo. De la 37 junaj kongresanoj, nur 15 estis kvitancitaj por tiu jaro; krome BEJO estis tiam tute "senkapa". La ĉeestantoj elektis la tutan estraron, kies prezidanto fariĝis Ilmar Gomes Ferreira.

Mia baza vidpunkto pri E-o ne ŝanĝis. Kompreneble estante pli juna, mia idealisma sinteno estis pli signifa ol la mia nuntempa. Vere juneco estas ĉiam idealisma, kaj tiu aspekto – mi agnoskas – donas al tiu homa vivofazo tiom da beleco kaj romantismo.Sed kiu estas mia baza vidpunkto pri E-o? Nu, mi opinias ke E-o estas unue kaj precipe lingvo. Ĝi estas kreita por fariĝi "komuna lingvo de la homaro". Malgraŭ tiu, mi kredas ke tia "komune-co" ne devas enhavi tiom emfazan signifon de "fina homa interkomprenigo" ĉar neniu lingvo, ĉu 'artefarita' ĉu 'natura', sukcesos tion pro la nehaltigebla homara emo ne komplete interkomprenigi per frata interkonsento.

Mi ankaŭ kredas al la ebleco E-o esti adoptita kiel la dua lingvo de tiu parto de la homaro, kiu bezonas uzi komunan lingvon en internaciaj rilatoj. Kaj miaopinie, adopti E-on kiel solvo al lingva problemo estas racia sinteno samkiel akcepti la postulojn de homaj rajtoj, naturprotektado, demokratio, ktp, cele al la konservado de pozitivaj aspektoj de nia mondo kaj al la konstruado de pli evoluita homaro.

"E.T. Phoned Home"

- Ĉu tiu lingvo, kiun vi parolas kaj disvastigas, vere funkcias internacie?
- Ŝajne jes, sed tio malmulte gravas al la brazilaj esperantistoj ĉar, pro tio ke ili malŝatas eŭropanojn kaj nordamerikanojn, loĝas tro malproksime de Azio kaj Oceanio tre kontentas pri si, ili preferas paroli Esperanton nur inter si mem kaj eĉ dediĉas pli da energio al la eldonado de nacia Esperanto-revuo ol al tiu de iu internacia. Ili ne plu konsideras la lingvon kiel rimedon sed kiel celon.
- Ĉu ne ekzistas fremdlingvaj najbarlandanoj, kun kiuj brazilanoj povas paroli esperante?
- Jes, sed ili estas hispanlingvanoj kaj la hispana estas tiel simila al la lingvo de brazilanoj, ke ĉi tiuj ne emas paroli Esperante kun ili.
- Kion do brazilaj esperantistoj faras?
- Ili organizas naciajn kongresojn por paroli internacian lingvon...
- Tamen la esperanto-movado kreskas en Brazilo, ĉu ne?
- Treege! Kiam du brazilaj esperantistoj renkontiĝas, ili starigas Esperanto-asocion; kiam tria aperas, li fondas apartan organizaĵon... Krome, ili estas tre entreprenemaj kaj aplikas al la Esperanto-movado la Biblian ordonon:"fruktu kaj multiĝu". Pro tio ili volis organizi apartan Pasportan Servon, planas la fondadon de plia esperantista komunumo kaj eble estonte eĉ entreprenos la kreadon de nova internacia lingvo. (...)
- Nu, kiel brazilaj esperantistoj laboras por disvastigi Esperanton?
- Ili semas kaj semas konstante.
- Ĉu ili plugas?
- Ne! Ili semas kaj semas konstante.
- Certe ili sterkas, ĉu ne?
- Ne! Ili semas kaj semas konstante.
- Ili almenaŭ akvumas, mi supozas.
- Ne! Ili semas kaj semas kaj semas kaj semas kaj semas kaj...

El Impulso, n-ro 1 / 1984

José Mário Marques, advokato, Natal

Mi nun estas 51-jara. Plurfoje mi provis lerni la lingvon pere de esperanta broŝureto, ricevita donace de mia plejaĝa frato kiam li studis en katolika seminario.

Kolegino mia, informita de mia intereso pri Esperanto, min sciigis, ke ŝia frato estis antaŭ pli ol 20 jaroj eklerninta tiun lingvon kaj li proponis pruntepreni mianome gramatikon. Per tiu libro mi memlernis Esperanton en unua duono de 1961 kaj post trimonata studado mi finis ĝin, kaj - mirige! - sukcesis legi la libron "Veterano".

> “...kaj post trimonata studado (...) - mirige! - mi sukcesis legi la libron ‘ Veterano’.”

En la tempo de mia esperantistiĝo ne estis junulara movado en Brazilo. En la komencaj monatoj de 1964 mi translokiĝis al Natal, por daŭrigo de miaj studoj, kaj tie mi persone kontaktis la tri solajn esperantistojn, kiuj multajn jarojn antaŭe aktivis por la lingvo. En la fino de 1966, mi jam estis renkontinta 2 junulojn (José Raposo da Silva kaj Ereni Pereira), krom mi, interesatajn pri lernado de la lingvo. En kolektiva vizito al S-ron Arlindo Castor de Lima, ni estis informitaj pri la ekzisto de Guanabara Esperanto-Junularo kaj pri ties deziro kontakti junajn esperantistojn el la tuta lando cele al fondo de aliaj Esperanto-Junularoj tra Brazilo. Ni tiam decidis organizi kurson, kies malfermo okazis en aprilo/1967. En la monato septembro ni estis informitaj pri la Manifesto de Santos Dumont, prenita de Guanabara Esperanto-Junularo, Ceara Esperanto-Junularo kaj Ribeirão Preto Esperanto-Junularo (?), laŭ kiu fondiĝis BEJO, ricevante samtempe ekzempleron de la revuo Impulso kaj de la informbulteno BEBO, kun insigo de aktivado de ĉiuj junuloj kaj fondo de lokaj junularoj. En aprilo 1968, mi komencis kurson. Ĉirkaŭ 18 novaj lernantoj eklernis efektive la kurson. Estas aparta kuriozaĵo pri ĝi. Komencinta en Spiritista institucio, la plejmulto el la lernantoj elektis poste translokiĝi al alia loko, pli proksima por la plejmulto: protestanta lernejon. En la sekvanta jaro, tiu grupo partoprenis sub mia gvido kompletigan kurson en apudĉambro de katolika preĝejo! Vere ekumena kurso.

Mi estis elektita Sekretario de BEJO en 1969 kaj Prezidanto de BEJO en 1970. Tiam, ŝajne pro la degeneriĝo de la politika situacio de la lando kaj manko (BEL) aŭ fino de la financa apogo (KKE) al la nova organizo, Guanabara E-Junularo, en Rio (ĉefa motoro de BEJO, kune kun CEJ, en Fortaleza) ekmalviglis, unue per la perdo de Wechsler, kaj poste per la perdo de Gustavo kaj fine de Paulo Viana kiu rezignis pri la sekretariecon de la nova nacia junula organizo. Kaj en julio 1970 la ĉeestantaj junuloj en la Brazila Seminario en Belo Horizonte decidis transdoni la gvidon de BEJO al la nordorienta regiono, pro tio ke nur en tiu regiono ankoraŭ la junulara movado vere estis ankoraŭ aktivanta. Sen antaŭa sciigo aŭ interkonsento, oni decidis (ĝis nun mi pensas ke tiun decidon prenis Sartorato sola! - la sola de la grupo en GEJ kiu restis aktivanta ĉe BEJO) elektis min Prezidanto kaj Carlos Lima Melo, el Fortaleza, Sekretario de BEJO. Estis indikita de mi kiel kasistino mia fianĉino, poste edzino Iraci Nobre Marques.

Tiam vere reliefan laboron realigis Carlos Lima Melo, kiu vojaĝis tra la tuta regiono (Natal, Caruaru, Maceió kaj Rio Largo-AL), gvidanta kursojn laŭ de li adaptita simpligita Cseh-

metodo, fukciigante la tiam nomatan "Instrua Servo de BEJO".

Inter miaj taskoj, krom la kunordigo de la agado naciskala de la estraro kaj regionaj vicprezidantoj, troviĝis ankaŭ la respondeco pri la eksteraj rilatoj kun TEJO, el kio rezultis sistema perletera kontaktado kaj informado pri BEJO-laboroj. El tio rezultis inviton por ke mi respondecu pri la Regiona Agado en Latinameriko, taskon kiun mi prizorgis ĝis la fino de la jaro 1971, kun provoj kontakti junulojn en la tuta latinamerika kontinento, el kio rezultis en Ĉilio la fondo de la tiea junularo fare de Ivan Mattig Catalan.

El eksteraj rilatoj kun TEJO, rezultis inviton por ke mi respondecu pri la Regiona Agado en Latinameriko, kun provoj kontakti junulojn en la tuta latinamerika kontinento, el kio rezultis en Ĉilio la fondo de la tiea junularo fare de Ivan Mattig Catalan.

En la fino de la jaro 1970 komencis okazi strangaj problemoj en la movado en Natal. Nia Junulara Klubo estis akuzita pri politika subfosa aktivado, kio estis malvera. Poste ni malkovris, ke tri anoj de nia membraro kunvenis aliloke, laŭdire por esperanta laboro, sed fakte por kontraŭregistara aktivado. Pro tio ke mi prenis sintenon rekte kontraŭa al tiu aktivado, ĉar mi kredis ĝin rekte malutila al nia juna movado, tio estis kaŭzo de skismo inter niaj membroj, kun apero de malfido inter parto de la membraro kaj mi, kiu reflektis kaj paralizis la tutan agadon, kaŭzis rompon de la interna kohero de la grupo kaj malvarmiĝo (nemiaflanka) de la rilatoj inter mi kaj la plejmulto el la restantaj membroj.

"Nia Junulara Klubo estis akuzita pri politika subfosa aktivado. Poste ni malkovris, ke tri anoj de nia membraro kunvenis aliloke, laŭdire por esperanta laboro, sed fakte por kontraŭregistara aktivado."

En la duono de la jaro 1971 la ĉefa akuzito pri tiuj problemoj, pro tio ke pamfletis urstrate kontraŭ la vizito de prezidento Medici al Natal, estis arestita kaj torturita. La suspektemoj kiuj falis sur la klubo kaŭzis la forfuĝon de la plejmulto el la membraro pro timo, eĉ teruro ĉe multaj, inkluzive mia edzino, kiu postulis detrui mian kolekton de la Revuo El Popola Ĉinio, por eviti pligravigon de la suspektoj en kazo de polica vizito. Poste tiuj revuoj malaperis el mia domo senspure.

Kiam aperis la suspekto, en la fino de 1970, la plejmulto el la grupo volis transdoni al la loka armea kazerno ĉiujn gazetojn el la socialismaj landoj (ni havis bonegan kolekton en nia biblioteko: *Nuntempa Bulgario*, *El Popola Î inio*, kaj aliaj materialoj el komunistaj landoj, Pollando kaj baltaj respublikoj), sed mi tiam forte kontraŭstaris al tio, inkluzive ĉar tiel agante, ni povus eĉ plipravigi/pligravigi la suspektojn. En la sekvanta jaro, post la aresto de la priparolita politika aktivulo, kiam mi jam ne partoprenis fakte la kluban agadon, la restantaj membroj, panikis kaj iris grupe/procesie al la loka armea kazerno kaj transdonis tiun "subfosan" materialon.

Samtempe, en niaj kursoj, komencis aperi homoj kies hararoj estis tonditaj laŭ la kazerna sistemo, kiuj en koridoraj kontaktoj kun la lernantoj sufloris al ili ĉesi la studadon de tiu lingvo, "ĉar ĝi

estas la lingvo de Kubo". Vi imagas kio okazis al kursoj post tiuj avertoj.

Dum tiu sama jaro, komencis okazi pluraj strangaĵoj en la komunikado inter la ĉefaj aktivantoj de BEJO: Sartorato, en Rio; Nogueira kaj Carlos Melo en Natal; kaj mi en Natal; korespondaĵoj prokrastiĝis, materialoj senditaj de unu al alia, eĉ registritaj ofte perdiĝis senspure ĉe la poŝto. Laŭ miaj registroj, post aŭgusto 1971, la laboro tute paraliziĝis. Kaj mi, kiel prezidanto ricevis fortajn plendojn ĉefe de Carlos Melo kiu volis respondecigi min, eble prave, pri la stato de la aferoj, laŭ li kaŭzita de mia manko de aktiveco.

> "Li pensis ke mi rezistus al la ideo (rezigni la prezidantecon), ĉar ili en Fortaleza estis rimarkintaj, ke mia tuta agado ĝistiama celus nur altigi mian personan prestiĝon ene de la movado (!)"

En januaro 1972, mi ricevis neatenditan viziton de li kiu postulis intervjuon kun, kiu okazis en la domo de Jose Soares.Tie li kaj laŭ li, ankaŭ Nogueira, konsilis min rezigni la prezidantecon, ĉar laŭ ilia opinio estus plibone, ke la tuta laboro de nun devus koncentriĝi en Fortaleza, kiu havus pli da kondiĉoj ĝin daŭrigi la laboron (li daŭre kiel sekretario, kaj Nogueira kiel Prezidanto). Por lia surprizo, mi tuj akceptis. Lia surprizo, kiel li tiam konfesis, estis kaŭzita ĉar li pensis ke mi rezistus al la ideo, ĉar ili en Fortaleza estis rimarkintaj, ke mia tuta agado ĝistiama celus nur altigi mian personan prestiĝon ene de la movado (!), tio estas mi estis uzanta BEJON por personaj celoj.

Mi tute forlasis BEJON, kaj la laboron por TEJO pri la latinamerika regiono. Tiam kaj tiel melankolie finiĝis tiu unua periodo de BEJO, komence vere tre brila kaj kiu efektive inaŭguris novan kaj seriozan modelon en la agado por Esperanto en Brazilo. Post BEJO la movado estis alia. BEJO mortis dum pluraj jaroj, tamen pluraj aktivuloj kiuj formis BEJON daŭre restis en la movado kaj eklaboris laŭ tute novaj modeloj, kaj ĉefe kun tute nova entuziasmo.

Neniel ŝanĝiĝis mia vidpunkto pri esperanto aŭ pri la movado! Mi ĉiam havas la saman fidon kiu min inspiris la artikolo "Essência e Futuro da Língua Internacional", kiun mi unuafoje legis antaŭ 36 jaroj. Mi, dum kelkaj periodoj, seniluziiĝis pri pluraj movadanoj, sed ne pri la antaŭaj membroj de la estraro de BEJO, kiujn ĉiujn mi daŭre respektas kaj admiras.

Rosana Caramez, ŝtatoficisto
Rio de Janeiro

Mi estas 40-jaraĝa. En 1974, mi legis libron de Ramatis, kiu rakontas pri la frateco, kiun la ideo de Esperanto entenas. Mi estis tre kortuŝita de tiu ebleco kaj sinjoro preskaŭ 80-jaraĝa, mia konato, komencis instruis al mi Esperanton per la sama libreto, kiun li uzis por sia memlernado.

Tiam mi lernis la anglan kaj mi parolis pri Esperanto kun miaj kolegoj de kurso. Post kelkaj tagoj, mia kolegino aŭdis la adreson de Kooperativo en radio, kaj ni ambaŭ komencis lerni la bazan, ĉiusabate. Iam aperis en Kooperativo Ciro Gomes de Freitas, el Mato Grosso, kiu komencis paroli pri reaktivigo de la dormanta BEJO. En 1975, dum E-seminario en Valença (RJ), ni tion faris kun kelkaj junuloj tra Brazilo.

Elektiĝis Ciro kiel prezidanto, mi

kiel vic-prezidantino kaj Néia Lúcia de Souza, el Brasília, kiel sekretariino. Mi tre ĝuis tiun tempon, ĉar dum la seminarioj ni multe laboris: ni varbis membrojn, ni okazigis konkurson por elekti *Miss* BEJO kaj ni kolektis monon por la jaraj elspezoj. Kompreneble ni ankaŭ amuziĝis, nokte, post la laboroj de la seminario, ni kutime iris al dancejoj, kie ni dancadis ĝis la mateno.

Dum decembro 76, en Bona Espero mi restis kaj instruis la portugalan al la infanoj. Mi tre ŝatis la sperton, neforgeseblan por mi. En februaro 77 ni faris karnavalan grupon en Salvador, kaj partoprenis gejunuloj el SP, RJ, GO, RN kaj eĉ du eksterlandaninoj venintaj el Bona Espero, kiuj restis dum karnavalo inter ni.

Ni eldonis la bultenon "BEJO-Informas". Mi havis multe da laboro sola, ĉar dum la jaro mi ne havis helpantojn. Mi ricevis korespondaĵojn, kolektis artikolojn kaj liveris la originalojn al Jair Sales, por ke li reviziu la tuton.. Dum la seminario en Santos, 1977, ni elektis alian estraron, kies prezidanto estis Lourenço Sogabe.

Kiel sola filino, mi havis miajn plej bonajn amikojn inter esperantistoj. Pro Esperanto mi multe vojaĝis, kaj sola mi ne konus tiom da lokoj, kiom mi vizitis; do mia sperto pri E-Movado estas la plej bona! La idealo de Zamenhof vivas en la lingvo, kiun mi opinias unu el la plej belaj kaj perfektaj kreaĵoj de la homo. Mi esperas, ke E-o elstariĝos por la homaro kiel la plej ebla kaj facila solvo por la lingvaj problemoj kaj baroj en nia mondo.

Aloísio Sartorato, 52-jara,
Rio de Janeiro

Kiel kaj kiam esperantistiûis: mi esperantistiĝis en 63; kolego mia el la laborejo (divenu do: Amarílio Carvalho...) forte influis.

Kiun rolon havis la junulara movado en via esperantistiûo: en la tempo de mia esperantistiĝo, Amarílio Carvalho gvidis bazan kurson en fora kvartalo de Rio (Campo Grande) kaj tie li stimulis la gelernantojn fondi Esperantistan Junularon. Fakte tio okazis kaj ekestis Esperantista Junularao de Campo Grande, kiu okazigis plurajn junularajn eventojn: festojn, promenadojn ktp. Kvankam ne estante ankoraŭ esperantisto, mi partoprenis en pluraj iliaj aktivecoj kaj tutcerte la gaja kaj frateca etoso tie ekzistanta iel influis al mia deziro lerni la lingvon parolatan flue de multaj membroj de tiu junularo.

Periodoj de via estraraneco/juna aktiviûo:

- 65-67: kasisto de Guanabara E-Junularo
- 66-69: kasisto de BEJO
- 67-68: prezidanto de Guanabara E-Junularo

Viaj spertoj dum tiu periodo: ne nur administraj kaj kasistaj laboroj. Mi respondecis ankaŭ pri preparado de gazetoj: Bebo (informbulteno), Meteoro (organo de Guanabara E-Junularo), Impulso (oficiala organo de BEJO-kulturrevuo internacie laŭdata). Kelkajn mi mem redaktis; aliajn mi pres-aranĝis.

Aliaj amuzaëoj kaj strangaëoj: tipaj de nia movado, ĉu ne?... Mi sukcesis rememori pri unu detalo: inter la junaj membroj de Guanabara E-Junularo ni "inventis" aliajn vortojn por esprimi la sobrajn "urini" kaj "feki". Inter ni, ni diradis "maltrinki" kaj "malmanĝi". Dek jarojn poste (tio okazis en la 60-aj

jaroj!) mi legis en *Kontakto*, ke la junularo de iu IJK, la TEJO-Kongreso, en la fino de la 70-aj jaroj ankaŭ uzadis tiujn esprimojn. Do ŝajnas al mi, ke ni iel estis pioniroj kaj kreivaj, ĉu ne?

Î u intertempe ïanûiûis via vid-punkto pri esperanto aö pri la movado? Tute ne!

KONSTRUO

Chico Buarque
trad. L. Knoedt

Ĉifoje amis li kvazaŭ ĝi estus lasta foj'
L' edzinon kisis li kvazaŭ ĝi estus lasta foj'
Kaj ĉiun filon kvazaŭ li estus sola fil'
Li iris trans la straton per la propra tima paŝ'
Konstruon grimpis sur kvazaŭ li estus nur maŝin'
Kaj levis sur plataĵ' kvar murojn de solida fort'
Per briko apud briko laŭ desegne sorĉa plan'
Vualis la okulojn krom cemento, larmogut'
Li do sidigis sin kvazaŭ jam por sabatotag'
Ĉe fazeol'kun riz' kvazaŭ li estus princa moŝt'
Li trinkis kun singult' kvazaŭ li estus dronadant'
Li dancis kun rideg' kvazaŭ lin ravus muzikist'
Kaj stumblis en ĉiel' kvazaŭ li estus ebriul'
Kaj ŝvebis en aer' kvazaŭ li estus ia bird'
Surtere kuŝis nun kvazaŭ li estus mola pak'
Kaj agoniis en la mezo de la ĉefa voj'
Li mortis sur misflank' – Malhelpo en la trafikej'
Ĉifoje amis li kvazaŭ ĝi estus lasta foj'
L' edzinon kisis li kvazaŭ ŝi estus sola in'
Kaj ĉiun filon tre kvazaŭ temus pri la erarint'
Li iris trans la straton per la paŝ' de ebriul'
Konstruon grimpis sur kvazaŭ per tre solida fort'
Kaj levis sur plataĵ' kvar murojn kun ensorĉa log'
Per briko apud briko laŭ desegne saĝa plan'
Vualis la okulojn la cement kaj trafikej'
Li do sidigis sin kvazaŭ li estus princa moŝt'
Ĉe fazeol' kun riz' kvazaŭ ne estus io plej
Li trinkis kun singult' kvazaŭ li estus nur maŝin'
Li dancis kun rideg' kvazaŭ li estus tie ĉi
Kaj stumblis en ĉiel' kvazaŭ lin ravus muzikist'
Kaj ŝvebis en aer' kvazaŭ jam por sabatotag'
Surtere kuŝis nun kvazaŭ li estus tima pak'
Kaj agoniis meze de la voj' - dronadant'
Li mortis sur misflank' – Malhelpo en la ĉefa voj'
Ĉifoje amis li kvazaŭ li estus nur maŝin'
L' edzinon kisis li kvazaŭ laŭ ia saĝa plan'
Li levis sur plataĵ' kvar murojn kvazaŭ mola pak'
Sidigis poste sin kvazaŭ li estus ia bird'
Kaj ŝvebis en aer' kvazaŭ li estus princa moŝt'
Surtere kuŝas nun simile al ebria pak'
Li mortis sur misflank' - Malhelp' por sabatotag'

Notoj por la Historio de BEJO

RIO ESPERANTISTA numero 4, okt-dec/88, paĝoj 4-5

1987 estis, sendube, festa jaro. Esperanto centjariĝs, BEL okdekjariĝis kaj BEJO dudekjariĝis. Kaj kiam oni dudekjariĝas, estas taŭga momento por ke unuafoje oni rigardu malantaŭen.

En la komenco estis kvin junuloj en Rio de Janeiro: Alfredo Enio Duarte, Francisco Wechsler, Jair Salles, Sartorato. Estis la jaro 1964 kaj Paulo Sérgio Vianna kaj Aloísio preskaŭ ĉiusabate ili renkontiĝis en la sidejo de Brazila Esperanto-Ligo kaj ankaŭ en la sidejo de Kultura Kooperativo de Esperantistoj. Tiam interalie ili diskutis entuziasme pri la neceso fondi TEJO-sekcion en Brazilo.

En la komenco estis kvin junuloj en Rio de Janeiro: Alfredo Enio Duarte, Francisco Wechsler, Jair Salles, Sartorato. Estis la jaro 1964

Sed, en alia ekstremo de Brazilo, pli precize, en Fortaleza la sama penso venis al la kapo de kvin entuziasmaj junuloj: Carlos Lima Mello, Francisco Barbosa, Cesar Oliveira Barros Leal kaj du aliaj kies nomojn mi ne plu memoras. Al tiu grupo aliĝis la sekvintan jaron Roberto Passos Nogueira.

Malgraŭ la manko de kontakto inter la du grupoj, ambaŭ decidis ne tuj fondi brazilan junularan organizaĵon, sed atendi la tiam baldaŭ okazonta XIX Brazila E-Kongreso en Rio de Janeiro por diskuti kun aliŝtataj junuloj la konvenecon de tiu iniciato.

Kaj tiel okazis. En oktobro/65, la du grupoj renkontiĝis dum la kongreso kaj decidis ke la plej taŭga vojo antaŭ ol fondi BEJO-n estus organizi lokajn grupojn. Konsekvence aperis la du unuaj junular-grupoj: en Rio, Guanabara Esperanto-Junularo (GEJ) kaj en Fortaleza, Ceará Esperanto-Junularo (CEJ).

Dum du jaroj la du grupoj aktive agadis en siaj respektivaj teritorioj, varbante pli da membroj. Ili ankaŭ prelegis pri E-o kaj organizis plurajn kursojn en-kaj-ekster esperantaj organizaĵoj. Kaj dum tiu periodo, ili eldonis siajn proprajn bultenojn en senriproĉa esperanto-lingvaĵo: "Meteoro" oficiala organo de Guanabara Esperanto-Junularo, kaj "Verda Maro", oficiala organo de Ceará Esperanto-Junularo.

En 1967, la membroj de la du grupoj denove renkontiĝis. Ĉi-foje, en Santos Dumont, Minas Gerais, okaze de la II Esperanto-Seminario de Kultura Kooperativo de Esperantistoj. Post kunveno de prok. 30 gejunuloj venintaj el diversaj brazilaj ŝtatoj, oni konstatis ke la grundo jam estis bone preparita kaj decidis fondi BEJO-n "provizore". Ĉiuj aprobis kaj subskribis la dokumenton konatan kiel "Deklaro de Santos Dumont" (vidu IMPULSO Nº 1) kaj oni elektis provizoran estraron, kiu havis kiel ĉefan taskon la preparon de la statuto de la organizaĵo.

En la sekvanta jaro, okaze de la III Esperanta Seminario, en Nova Friburgo, la brazila junularo denove kunvenis kaj decidis pri la oficiala fondo de BEJO, aprobante ĝian statuton kaj konfirmante la "provizoran" estraro por plia du-jara mandato: Francisco Stefano Wechsler (Prezidanto), Roberto Passos Nogueira (Vic-Prezidanto de la Norda kaj Nordorienta Regionoj), Wilson Ferreira Martins (Vic-Prezidanto de la Suda Regiono), Umberto Ferreira (Vic-Prezidanto por la Centra Regiono), Paulo Sérgio Viana (Ĝenerala Sekretario) kaj Aloísio Sartorato (Kasisto).

La sidejo de BEJO funkciis en Rio de Janeiro, kie ekzistis tiutempe la plej forta loka junulara movado, kaj kie loĝis tri el la estraranoj: Francisco, Paulo Sérgio kaj Aloísio.

BEJO glate progresis. Fondiĝis novaj junularaj grupoj en pluraj urboj. La oficiala organo (IMPULSO) aperis kaj "furoris" en-kaj-ekster lande, TEJO akceptis la oficialan aliĝon de BEJO.

...pluraj membroj de la junulara grupo estis invititaj ĉeesti al la policejo por doni klarigojn...

La tri estraranoj en Rio estis plene ŝarĝitaj je pluraj laboroj. Francisco zorgis pri la revuo ĉe la presejo (ĝi estis sub la redakta respondeco de Nogueira) kaj pri eksterlandaj kontaktoj (TEJO, UEA kaj aliaj). Paulo zorgis pri enlanda korespondado, kontakto kun junulargrupoj kaj redaktado de BEbo (BEJO informa bulteno). Mi respondecis pri kasistaj laboroj kaj kunhelpis Paulo en la redaktado de BEbo, krom zorgi pri ĝia pres-aranĝo. La ceteraj vic-prezidantoj agadis laŭeble en siaj respektivaj regionoj.

En 1969 (...) komencis novan tre pozitivan fazon (la nordorientan").Tamen la politikaj okazaĵoj de la 70-aj jaroj en nia lando ankaŭ atingis la movadon

Tamen, en la dua semestro de 68, okazis eta krizo en BEJO. Paulo Sérgio, pro personaj kialoj, devis forlasi la estraron kaj mi subite estis ŝarĝita ankaŭ de la sekretariaj kaj redaktaj laboroj de li faritaj ĝis tiam.

La situacio fariĝis por mi neeltenebla, ĉar ne estis eble fari samtempe la laboron de du personoj. Tiam mi skribis al Mello, Nogueira kaj José Mário (el Natal): la junulara movado en Rio malfortiĝis, dum en nordoriento ĝi daŭre prosperas (tiutempe, jam estis okazintaj du regionaj E-renkontiĝoj organizitaj ekskluzive de la junularo!); do, alvenis la momento por ke la administra parto de BEJO iru al la manoj de nordorientanoj. Kaj en 1969, en São Paulo, okaze de la E-a Seminario tie okazinta, elektiĝis nova BEJO-estraro, kies prezidanto fariĝis José Mário Marques, el Natal, ĝenerala sekretario, Carlos Lima Melo, el Fortaleza, kaj kasisto, Iraci Sales Nobre, el Natal. Vic-prezidantoj fariĝis: Marcelo Engrácia Garcia (Sudo), Manoel Floro (Oriento), Roberto P. Nogueira (Nordoriento), Waldir Antonio Silvestre (Centro).

BEJO, do, komencis novan tre pozitivan fazon (la "nordorientan"). La revuo daŭre aperis. Novaj grupoj estiĝis. Oni instruis la lingvon amase. Tamen la politikaj okazaĵoj de la 70-aj jaroj en nia landa ankaŭ atingis la movadon. "Oni diris" ke iu membro de Rio Grande do Norte E-Junularo okazigis politik-tendencan kunvenon en la esperantista sidejo. La sekurec-polico sciis pri la afero kaj pluraj membroj de la junulara grupo estis invititaj ĉeesti al la policejo por doni klarigojn pri tiu afero (ĉu ili ankaŭ estis perfortitaj, mi ne scias, tamen oni konjektis pri tio). Tia okazintaĵo grave malvarmigis la entuziasmon de la nordorientanoj. Iom post iom BEJO agoniis kaj, finfine, komplete stagnis.

Nur en 1975, kiel fenikso, ĝi revivigis el la cindroj pere de junulargrupo en Rio de Janeiro, sub la gvido de Ciro Gomes de Freitas. Sed tio estas alia historio, kies detalojn povas pli bone rakonti la dua generacio de BEJO-anoj.

La Dua Festivalo Pri Populara (Ĉu Popola?) Muziko

La Timiga Komenco

Meze de soifa atendado kaj murdema etoso, komenciĝis – aŭ ektumultis – la Festivalo. Per surdiga blekado ĝi ankoraŭ pli bombaste finiĝis. Kaj inter la komenco kaj la fino estis aŭdebla iom da muziko, kiom permesis la nervostado de la spektantaro. La ejo Maracanãzinho ŝajnis areno kie gladiatoris la gekantistoj, fervore penantaj aŭdebligi sin.

Restas do la demandoj: ĉu valoris tiela klopodado? Kia estis la artnivelo – aŭ fuŝ-nivelo – de la Festivalo? Ĉu prezentiĝis taŭgaj kanzonoj? Ĉion ĉi ni strebos al vi respondi, se ne ĉiuj muzoj estis forpelitaj de Rio de Janeiro.

Komisiono havis la inferan taskon selekti, el inter centoj da plagiataĵoj, maldecaĵoj, simplaj bruoj kaj kelke da seriozaĵoj, 46 aŭskulteblajn pecojn.

La afero dividiĝis je du partoj: la Brazila kaj la internacia. Komisiono havis la inferan taskon selekti, el inter centoj da plagiataĵoj, maldecaĵoj, simplaj bruoj kaj kelke da seriozaĵoj, 46 aŭskulteblajn pecojn. Finfine, post harstarigaj diskutoj kaj disputoj, elektiĝis la feliĉa grupo. Tiun ĉi oni provis prezenti en du nokto-sesioj. La publiko vigle partoprenis en la muzika fenomeno, eligante plej variajn kromakompanojn, kiuj iris de simpla aplaŭdo ĝis kromata fajfo. Post pluraj komplotoj, la juĝkomisiono elsavis 20 komponaĵojn, kaj el tiuj ĉi aperis fine la venkintoj.

"La plejmulto de l' kanzonoj estis trankviliga, eĉ tiel, ke ni endormiĝis apud la televid-aparato."

La Polemika Nokto

En la lasta nokto ĉiuj ploris: kelkaj de ĝojo, la cetero de malĝojo kaj furiozo. (Ni aparte diru, ke ja ne troviĝis motivo por tiela ekscitiĝo; vere, la plejmulto de l' kanzonoj estis trankviliga, eĉ tiel, ke ni endormiĝis apud la televid-aparato; sed ni ne analizos ĉi tiujn. Tamen, ni emfazu la valoron de kelkaj.)

"La duan lokon ricevis 'Travessia' de Milton Nascimento, (...) tamen ĉi kanzono probable ne sukcesos akiri popularecon, ĉar la teksto estas peza, kvankam bela."

La tria lokon gajnis la kanzono "Carolina", de fama Chico Buarque de Holanda. Multaj asertas, ke li meritus la unuan lokon pro la delikateco de l' melodio kaj liriko de la teksto. Eble tion pruvas, ke en Rio ĉiuj ĝin fajfas kaj kantetas: kredeble en la resto de Brazilo jam okazas la samo.

La duan lokon ricevis "Travessia" de Milton Nascimento, elektita – kvankam ne merite – la plej bona kantisto de la Brazila parto. Tian klasifikon la spektantaro ĝenerale aprobis, tamen ĉi kanzono probable ne sukcesos akiri popularecon, ĉar la teksto estas peza, kvankam bela.

Granda polemiko ankoraŭ furiozas pri la kanzono ricevinta la unuan lokon: "Margarida", de Gutemberg Guarabira. La teksto estas trafa, sed la muziko vekas diskutojn, ĉar la aŭtoro enmiksis folkloran melodion kiel refreno, krom la "Nupta Marŝo" de Mendelssohn ĉe la fino. Vere, la kanzono estas heterogena, kaj ni tre dubas, ĉu "Margarida" meritus klasifikon.

Parto de l' publiko forte aplaŭdis "Fuga e Antifuga" ("Fugo kaj Kontraŭfugo"), muziko de Edino Krieger kaj teksto de Vinícius de Morais, tre bela kanzono; sed ĝi ne meritas la epiteton "populara", ĉar tro klasikema kaj kontraŭpunkteca. Apartan admiron vekis la knabino Gracinha Leporace, kiu sukcesis interpreti firme kaj samtempe delikate komponaĵon de sia frato. (Ĝi estis unu el la maloftegaj momentoj, kiam la publiko ne bruaĉis, sed aŭskultis.)

La Ĵaz-internacia Parto

Unu semajno poste, komenciĝis la internacia parto de l' Festivalo. Dume, svarmis tra l' tuta urbo minijupoj de famaj (ĉu pro talento aŭ muzika aŭ fizika?) kantistinoj el la tuta mondo. Bedaŭrinde, la nivelo de l' kantado ne estis tiel alta, kiel la rando de la jupoj. Vere, vere, importitajn artiklaĉojn ni devis engluti. Popola muziko preskaŭ ne aperis – ĵazo dominis la mensojn de la komponistoj.

Saviĝis nur kelkaj havantaj individuecon: la Greka, la Usona, la Monaka kaj unu aŭ du aliaj. La cetero estis tute sensaŭca kaj senspica.

La fina rezulto estis unuanime malakceptita: venkis Itallando kies ŝablona komponaĵo plaĉis al neniu. La duan lokon ricevis Usono, kun kolosa blekado fara de l' hordo – pardonon! – publiko. Sed la ejo preskaŭ falis, kiam oni disanoncis la trian lokon: Brazilo (partopreninta per "Margarida"); okazis vera simfonio de orelŝiraj sonoj; neniam manifestiĝis tiel laŭta protestado. Ekde tiam, ni suspektas, ke la Brazilanoj estas iomete ŝovinismaj...

Sufiĉas nur aldoni, ke la juĝkomisiono rifuĝis malantaŭ fortikegaj kirasoj. Ke la aŭto de unu el la juĝistoj estis duone dispremita de l' atakema spektantaro. Kaj ke ĉiuj eksterlandaj gekantistoj esprimis sian miregon pri la "pasia konduto" de la brazila popolo. Kompreneble, tion ili diris laŭde...

> "La juĝ-komisiono rifuĝis malantaŭ fortikegaj kirasoj,(...) la aŭto de unu el la juĝistoj estis duone dispremita de l' atakema spektantaro."

Karaj amikoj, venontjare okazos nova Festivalo, se pluvtorento ne detruos la urbon Rio ĝis tiam. Do, nur atendu! Ĉar tuta Rio promesas venontjare ankoraŭ unu fojon elmontri siajn gastemon kaj pasion pri muziko. Se la muzoj permesos, eĉ ne unu eksterlanda kantisto restos viva!

Finfine Esperanto estis akceptita ĉe Unuiĝintaj Nacioj!

En la oficialiga tago oni petis de nia heroo, Maŭrico, la verdulo, ke li deklamu poemon, en esperanto, kiu pruvu la facilon, belsonon kaj la internaciecan "memkomprenblon" de nia kara lingvo. Kaj tion li plej brile faros! Ni vidu!

"La Aĵo"
En iu ejo iuj ja umas!
Jen ulo kaj ino en ia geo!
Kia ujo!
Kaj kial tiaj aĉas ĉie?!
Kiojn?
Ĉu?
Abund'!

La Brazila Nova Kino

Enmeza de la nuna produktado de filmoj en Brazilo, ekzistas movado, kiu povas esti konsiderata kiel ekflagro de nacia kin-konscio. Tiun movadon kelkaj insistas nomi “Nova Kino”.

Brazila Nova Kino ne eksplodis interne de la kinĉambroj sen ia kialo, ajnmaniere. Krom la ŝanĝo aŭ renovigo, kiujn trairis la kino laŭ monda vidpunkto, la pli profunda kono pri niaj problemoj, matureco da la publiko kaj industriigo kreis kondiĉojn, por ke tuj aperu kino vere “nia”, malsama al ĉio, kion ĝis tiam oni faris.

“La filmo, kiu praktike malfermis la nov-kinajn vojojn, estis ‘Rio 40 Graus’ (Rio 40-grada) de Nélson Pereira dos Santos”

La filmo, kiu praktike malfermis la nov-kinajn vojojn, estis “Rio 40 Graus” (Rio 40-grada) de Nélson Pereira dos Santos. En artikolo por la Franca kinrevuo “Positif”, Glauber Rocha diras ion al ni pri N. P. dos Santos kaj ties filmo: “Estis li, kiu unue faris filmon sendependan laŭ la entreprena vidpunkto – Rio 40 Graus (1954-a) – kaj tie oni trovas la unuajn politikajn poziciojn antaŭ la kolonieska situacio de Brazilo.”

En lando, kia Brazilo, plena de konfliktoj, kontrastoj kaj mizeroj la temoj estas grandegaj por ĉia arto. Nia literaturo estas vasta, kaj tekstoj por kino ne mankis. La granda Brazila problemo, kiu estas la nord-oriento, influis sur ĉiuj artaj fakoj kaj ne povus ne sentigi sin ankaŭ en kino.

Multaj direktistoj movis siajn kamerojn al la kamparo, al la interno de la nord-orienta regiono, kiu ĝis hodiaŭ, en kelkaj partoj povas esti konsiderata kiel prototipo* de feŭdisma socio.

En lando, kia Brazilo, plena de konfliktoj, kontrastoj kaj mizeroj la temoj estas grandegaj por ĉia arto.

Antaŭe, kino farata tie ĉi ne havis bonas teknivelon. Oni bezonis do temon sufiĉe drameca por kompensi tian teknik-mankon, kaj ŝatigi la popolon, donante ian komercan profiton. Grava filmo, kiu komencis tiun ĉi periodon estis “O Cangaceiro” (La Bandito) de Lima Barreto, inkluzive premiita en la Festivalo de Cannes. La filmo pri “cangaceiros” (speco de banditoj de nia nord-orienta regiono) rapide komerciĝis kaj transformiĝis en ia speco de “Uson-vakera” genro en Brazilo.

Tuj aperis verkaĵoj bazitaj sur ĉi tiuj temoj, kiuj surprizis la plej intelektecan publikon, ĉar multfoje ili ne havis bonan komunik-kapablon kun la popolo. Ili estis kelkfoje iom hermetikaj filmoj. Kiel ekzemplojn oni citas: “Deus e o Diabo na Terra do Sol” (Dio kaj Diablo en la Lando de l’ Suno) de Gláuber Rocha; “Vidas Sêcas” (Sekaj Vivoj) de Nelson Pereira dos Santos, filmo konsiderata kiel la unua vere matura de l’ movado; “A Hora e a Vez de Augusto Matraga” (La Horo kaj Ŝanco de Aŭgusto Matraga) de Roberto Santos; “Menino de Engenho” (La Knabo de l’ Kanplantejo) de Válter Lima Jr.; kaj aliajn.

“ ‘Vidas Sêcas’ (Sekaj Vivoj) de Nelson Pereira dos Santos, filmo konsiderata kiel unua vere matura de l’ movado”

Oni povas diri, ke tie ĉi ekzistas konscia kino, ligita kun kaj partoprenanta en la vivo de la lando. Kino, kiu jam akiris propran teknikon,

komencante de preskaŭ-improvizaĵo kaj de ne imitado al jam difinitaj skoloj; kino renoviganta valorojn estetikajn kaj moralajn.

Ĝia kvalitpruvo povas esti, ekzemple, la varma akceptado de tiaj filmoj en Eŭropo, precipe en Francujo.

(*) proto: ĉefa kaj pratipa.

(...)

La plimulto de la direktistoj estas ankoraŭ je la unua aŭ dua verkaĵo, kaj nur kelkaj jam faris tri aŭ pli. Aliaj direktistoj faras filmojn inter nova kaj malnova kin-skoloj, iom aŭ tute ekstere de la movado, kiel: Anselmo Duarte (O Pagador de Promessas – La Vot-plenumanto), ĉefpremio en Cannes; Roberto Farias (Assalto ao Trem Pagador, Selva Trágica – Prirabo al la Mon-trajno, Tragedia Ĝangalo); Válter Hugo Khouri (O Corpo Ardente, Noite Vazia, As Amorosas – La Arda Korpo, Vakua Nokto, La Amorulinoj); kaj aliaj.

Augusto Freire

El Impulso n-ro 3 / 1968

Dum la Brazila Kongreso de la Junularaj Esperantistoj (Brazila Junula Esperantista Asocio - BJEA) okazinta dum la lasta semajno de Julio 1979, en Uberabo, Minas Gerais, Brazilo, prelegas japana doktoro F. Ykema pri “LA DANĜEROJ DE LA MALSANO konata sub la scienca nomo “VERDAKIS ADO”. Instruis la preleginto ke la konsekvencoj de tiu malsano normale aperas post naŭ monatoj post iu ajn kongreso. Sed tio estas maniero por antaŭenigo de nia movado. m.m.

El Impulso, n-ro 3 / 1979

Se vi jam pretas aĉeti bileton por forveturi al planedo Marso, estu singarda!!!

Antaŭvidante la Futuron

La tuta numero de “Science Journal”, Oktobro 1967, estas dediĉita al iu tre nova kaj alloga temo: scienca antaŭvido de la futuro. (...) Ni ĉerpis kelkajn el la plej interesaj antaŭvidaĵojn kaj ilin prezentos tie ĉi kun la datoj, post kiuj ili eble realiĝos:

- Primitiva artefarita lingvo - 1979
- Evoluo de iu “universala lingvo” el aŭtomata komunikado - 1980
- Biokemiaĵo por kreskigi novajn membrojn kaj organojn - 1995
- Ebleco uzi drogojn por pliigi inteligentecon - 1985
- Ebleco de edukado por rekta inform-enmeto en la cerbon - 1997
- Rekta elektromagneta interago inter cerbo kaj maŝino - 1990

El Impulso n-ro 2 / 1967

BEJO - Kongresoj

N.	Urbo	Ŝtato	Jaro	Mon.
1	Santos Dumont	MG	67	jul
2	Nova Friburgo	RJ	68	jul
3	São Paullo	SP	69	jul
4	Natal	RN	82	jan
5	Iporá	GO	83	jan
6	Promissão	SP	84	jan
7	Cuiabá	MT	85	jan
8	Porto Alegre	RS	86	jan
9	Fortaleza	CE	87	feb
10	S. José d. Campos	SP	88	feb
11	Campina Grande	PB	90	feb
12	Tupã	SP	91	jan
13	Barra do Garças	MT	92	jan
14	São Paulo	SP	93	jul
15	Natal	RN	94	jul
16	Juiz de Fora	MG	95	jul
17	Ribeirão Preto	SP	96	jul
18	Curitiba	PR	97	jul

KROKODILA ANGULO

SPECIALA LECIONO POR KOMENCANTOJ !!!

VERBO ŜOVI:

Ŝovi ŝuva,
Ŝovi sejn parah !

El Impulso, n-ro 2 / 1983

Venas jardeko,
pasas jardeko kaj...

Laborplano por la Unua Semestro (BEJO) - 87

1 - Starigo de varbkampanjo por pligandigo de BEJO-anaro.
2 - Eldoni IMPULSO-n trimonate.
3 - Pligrandigi la reprezentantaron.
4 - Okazigi regionajn rekontiĝojn.
5 - Okazigi tendumadojn.
6 - Prizorgi publikan utilecon de BEJO.

El MOMENTON!, n-ro 25 /1987

BEJO - Nuntempe (1996-1998)

Estraro

Cláudio M. Zaina	prezidanto	Campinas - SP
Reinaldo Marcelo Ferreira	1a sekretario	Pres. Prudente - SP
Carlos Eduardo de Oliveira	1a kasisto	Paulínia - SP
Maximillian Moraes Cid	2a sekretario	Juiz de Fora - MG
James Rezende Piton	2a kasisto	Campinas - SP

Adresoj

Poŝto: BEJO - Caixa Postal 1097, 13001-970, Campinas, SP - Brazilo
Ret-poŝto: bejo@digicron.com
Hejm-paĝo: http://www.digicron.com/bejo

Ĉu vi konas la "Junul-Kurson", kie Karlo kaj Johanino travojaĝas la planedon instruante esperanton? Post la Aventuroj de Karlo kaj Johanino en la kurso, vi spertos la...

AVENTUROJ DE JOHANINO KAJ KARLO II

(La Krokodilo Kontraŭatakas)





















Konsiloj al kursgvidantoj

"NE NUR PAROLU AŬ SKRIBU MULTE... SED ĈEFE VI DEVAS ANKAŬ AGI..."

* BALDAŬ: AVENTUROJ DE JOHANINO KAJ KARLO III: "SERĈANTE ~~SPOCK~~ JOHANINON"
AVENTUROJ DE JOHANINO KAJ KARLO VI: "REVENADO DE ~~JEDI~~ JOHANINO"
AVENTUROJ DE JOHANINO KAJ KARLO V: "LA LASTA BATALO"
AVENTUROJ DE JOHANINO KAJ KARLO VI: "LA REKOMENCO"...

NATIONAL KID — JOHANINO

IDEO: RUBENS-333
TEKSTO: RUBENS-333
DESEGNIS: RUBENS-333
KOSTUMOJ: RUBENS-333
MUZIKOJ: RUBENS-333